ANTAŬEN
suplemento de Informilo
1/24 Marto 2016

**Enhavo:** Verda koloro, Karuleto

# Verda koloro

La printempo enrigardis mian fenestron per branĉeto kun antaŭ nelonge verdiĝinta foliaro. Tiu branĉeto, tremetanta pro la plej malforta vento, memorigis min pri tiu alia printempo.
Mi kuras laŭ parka aleo inter freŝaj verdaĵoj apenaŭ ekflorintaj. Mi mem estas junaĝa kaj enamiĝinta. La verdan robon mi surmetis hodiaŭ, la kapon kovris ankaŭ verda travidebla skarpeto. Anhelante pro tro rapida kurado kaj pro estonta ĝojkora rendevuo kun la amato mi nenion rimarkis. Ekpreninte miajn manplatojn li kisis ĉiujn fingrojn emociplene ekflustrante: "Mia verda sorĉistino! De nun la verda koloro iĝas la simbolo de nia feliĉo!"

Dek jarojn daŭris nia kunvivo kaj ni revis pri infanoj, sed ...
La rememoroj estis rompitaj: super mi kliniĝis flegistino por proponi kuracilon ...
Denove mi ekrigardis ekster la fenestrovitro. La konata branĉeto salutis min afable kaj subite malaperis pro forta puŝblovo. Same nian familion ruinigis forta uragano.
Ni divorcis. La juĝproceso okazis antaŭ la du monatoj, dum kiuj mi troviĝas en hospitalo. Neatendita perfido de la edzo infarktigis mian denaske malsanan koron ...
Reveninte en la loĝejon antaŭ ĉio mi neniigis ĉiujn verdkolorajn aĵojn, kio simbolis nun mian kvazaŭan mortigon.
Pasis duonjaro. Mi provis alkutimiĝi al la soleco kaj por ĉiam forgesi pri la pasinteco, tamen mankis la animfortoj ...

Mi sidis antaŭ televidilo, indiferente aŭskultante informojn. Subita sonoro ektimigis min. Malferminte la pordon, mi apenaŭ ne svenis: sur la

ŝtuparplaceto staris la eksedzo. Li aspektis kiel homo post grava katastrofo. La nerazita mentono pli maljunigis lin, liaj senvivaj okuloj vere ektimigis min. Sur liaj brakoj kuŝis bebo, en la manoj li tenis sakon kun iuj ludiloj kaj boteletoj kun suĉiloj. Senvorte mi forportis la etulon kaj la patro silente postsekvis min. Ree atentinte la filon de la eksedzo kaj kuirinte kaĉon, mi sidis kaj nutris la fremdan knabeton, avide malplenigantan la boteleton. Observante tiun senhelpan kaj serzorgan vivulon, mi amare ploris. La kuirejon eniris la patro kaj mallaŭte diris: "Sciante pri via bonkoreco, mi turnis min al vi, esperante, ke vi helpos min, antaŭ kelkaj tagoj mortis la patrino de mia filo. Mi mem ne scipovas flegi la bebon ... pardonu min ... se vi forpelos ..."
Mi rigardis la dolĉe dormantan etulon, aŭdis lian spiradon, sentis lian korpovarmecon ... mi ne forpelis ilin. Rakonton de Raymond Schwartz sendis la geedzoj Milena kaj Jiří Jelínek.

## **Karuleto** (rakonto)

Nokte, ĉe la enirejo surasfalte, aperis skribaĵo: "Karuleto, mi amas vin!" per blanka emajla farbo surface de kortpurigista fuŝlaboro. Ĉiuj sesdek karulet-aĝulinoj de la domo (inter 10 - kaj 60-jaraj) ĉi-matene aspektis pli enigmaj ol nigraj kosmotruoj. Ĉiu mienis, ke la mesaĝo estas adresita ĝuste al ŝi. "Ho, kiel kortuŝe!" sentemiĝis iu el la inoj.
„Ĉu ankoraŭ vivas tia viro, aŭtenta kaj romantika, mi eĉ ne kredus, ke oni nuntempe tiel kavaliras“. "Eĉ ne diru!" subtenis la alia kaj nur unusola scias, ke tio estas skribita ĝuste por ŝi."
"Ŝi ja certe scias," aŭroriĝis ĉe la unua. "Kaj al neniu ŝi diros."
"Ĉu al mia Manjo skribite?" rimarkis porokaze patro de unu elsupozataj karuletoj. "Nu-nu, eraroj ja mankas," kontraŭis la virinojn! "Nu, kaj la literoj ne dancas," argumentis la ofendita patro. "Ne blindulo evidente skribis. Do, tute ne por vi, verŝajne."
Tiel vorte - post - vorte ekflamis konflikto inter la seksoj, generacioj kaj sociaj tavoloj. Sekvis portret-frapoj, blasfemoj kaj disŝiritaj bidfadenoj. Alveninta milicpatrolo ĉirkaŭ duonhoron ravrigardis la karuletbatalon de la domo kaj nur poste disigis ĉiujn.

Matene la skribaĵo ŝanĝiĝis. Iu ĝustigis la donitaĵojn kaj nun la skribaĵo plikonkretiĝis: "Karuleto de la sesa etaĝo, mi amas vin." Alietaĝaj karuletoj eksentis sin ekstreme ofenditaj je siaj bonsentoj.
"Ĉu oni povas esti tia kanajlo!" sciigis kvardekjara ekskaruleto de la kvina etaĝo. Retuŝado ja grandan cerbon ne postulas. Ĉu li ne florojn donacu almenaŭ?
Subtenis ankoraŭ unu eksigita kun la vizaĝo gratita hieraŭ honore al romantiko. Prefere li pli taŭgajn markojn faru anstataŭ ĉi-fiskribaĵoj... Se la farbo superfluas. La sesaetaĝaj karuletoj jen kaj jen rigardis ĉiujn kaj reveme enmemiĝis. Tiun reveman enprofundiĝon ne aprezis la edzo de unu karuleto. Li ŝatus riproĉeti la edzinon pro nekonvena konduto, sed troigis kaj puŝetis kompatindan virinon je la malica ĝojo de la ceteraj karuletoj de la domo.
Sekvatage oni farbkovris la subskribon kaj sur blanka fono per nigra farbo aperis: "Mil pardonojn, eraro. Karuleto ja de la kvinaetaĝe! Vin mi amas!"
Ĉirkaŭ la sesa matene kunvenadis spektantoj el najbaraj domoj. Kaj ne vane, ĝuste je la sepa ĉe la enirejo la vane ofendita virino de la sesa etaĝo kelkfoje vangofrapis sian maldiskretan edzon pro tio, ke li, kapraĉo, estas ĵaluza. La viro kulpeme snufis kaj ĵetadis hatajn rigardojn al surasfaltaj literoj. La virino estis aplaŭdata de la ceteraj virinoj de la korto, kiuj esprimis siajn ofendojn kontraŭ vivkunuloj per ovacioj. La viroj kunsentis miene kaj per gestoj, sed voĉigi ion ne kuraĝis.
"Jen kia, enpoŝigis ĉiujn," suspiris iu preskaŭ kvindekjarulo.
"Ja povus li sekrete en la orelo diri al sia korvundulino. Male, li amason tumultigas. Vi al via ĉiutage flustru. Ŝi eĉ ne tumultiĝos," rebatis najbarino.
"Al mi, imagu, neniu jam jarojn dudek kvin ion similan diris kaj okazas nenio. Dume mi ankoraŭ ne forpasis," kulpsente grumblis iu ulo.
"Jen do," balancis la kapon la virino kaj revenis al la spektaĵo.
"Kvinetaĝe malfraŭlinoj ne estas!" kriis unu el la viroj.
"Ĉu la malfraŭlinon ami neniu povas?" ekfurioziĝis la virinoj de la kvina etaĝo. "Ĉu frontpaĝo ne konvenas, ĉu? Kial vi silentas, ha? Oni vian edzinon hidulino nomas, sed vi? ... Kaj vi tiel starados, ĉu?"

Aperinta policpatrolo vokis subtenon kaj triteame ili ridegis kaj vetis. Post ĉio ĉi ili disigis la batalantojn kaj priprotokolis 23 administrajn deliktojn pro interbatiĝo. Matene surasfalte manifestiĝis: "Pro kio ĉiuj ĉi kokinoj paŭtas? Ja mia karuleto estas viro de la kvina etaĝo. Karuleto, mi amas vin."
La domestro, traleginte tion, aĥis kaj tuj vokis kvar ambulanco-teamojn.
"Pro kio vi bezonas kvar?" insiste demandis deĵorantino. "Kio okazas ĉe vi tie?" "En nia kvina etaĝo kvar karuletoj loĝas. Ĉu vere? Kaj ĉiu havas edzinon. Do vi rapidu. Viktimoj tuj aperos," klarigis la domestro.
"Aĥ, ci virhundaĉo!“ Aŭdiĝis de la kvina etaĝo kune kun hurlo kaj brulo de familiaj debatoj kun manbatoj kaj havaĵrompado.
"Ho!" ekkriis ĉiuj domanoj el la korto, "maljuste estas. Descendu, por ke ĉiuj vidu."
"Momenton!" venis sur la balkonon de la kvina etaĝo virino frizpinglita. "Ne baru la vojon al la ambulanco."
Sanitarservistoj preterportis du damaĝitojn. Ankoraŭ unu karuleto eldomiĝis memstare, fiere pririgardis la kunvenintojn, ordigis la hararon, subite griziĝintan, per ŝveliĝinta okulo postsekvis ambaŭ ambulancaŭtojn kaj diris: "Sentaŭguloj! Ĉifonoj!"
Poste li sendentabuŝe ridetis kaj svenis.
"Ej-ej-, civitanoj!" ekkonfuziĝis la amaso, "kaj la kvara kie estas? Eble, indus iri por helpi lin? Ĉu la pordon forbati kaj forpreni la senkonscian korpon de tiu furio?"
"Pro kio la kunveno estas ĉi tie?" eldomiĝis la lasta karuleto, "ĉu vi ne havas ion por fari?"
La amaso konsterniĝis, la viro estis zorge razita kaj kombita, en freŝa ĉemizo, li aspektis superbe, kvazaŭ fraŭlo konservita por altaro. Post la viro aperis lia edzino, demonstre ordigis la frizon de la edzo kaj brile ridetis al la najbaroj.
"Venjo, kio al vi? Indiferenta ia ..." ekmiris la virinoj.
"Kial do?" kontraŭmiris Vera, "tion ja mi skribis. Al mia. Mi amas lin, jen, pensis, skribu mi. Ĉu malrajtas?"
"Diru nur, ĉu vi estas normala," dubis la najbaroj.
"Ŝajnas normala," movis la ŝultrojn Vera.
"Kaj vi mem?" (Trovite en interreto)